

Leterkesto, 2.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991 aprilo 04.

<http://www.esperanto-gacond.ch/tac/91-010-A-3-Claude-kaj-Andree-GACOND-Leterkesto-2.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.

Ni daŭrigas nian salutadon al la skribintoj. Kiel ni diris la pasintan semajnon, estus bone, se ĉiu skribanto substrekus sian familian nomon kaj interkrampe donus laŭ la esperanta alfabeto la proksimuman prononcon de siaj nomoj familia kaj individua kaj de sia loĝloko, ĉar ni ofte ne scias, kiel elparoli tiujn nomojn skribitajn en lingvoj, kiujn ni ne konas.

A.- De Josef LECHERMEIER en Ingolstadt-Irgertsheim, Germanio ni ricevis informilon kun korespondadreso kaj ĝeneralaj informoj pri radiostacioj, kiuj emisias en esperanto. Koncerne Svisan Radion Internacian ni legas: "Kvankam la esperanto-elsendoj de SRI ne okazas ĉiutage, ili tamen atingas la nombron de 17 po semajno."

Cl.- Mi devas tuj averti, ke tiu uzo de la vorteto po estas eraro, kiun oni ofte rimarkas en leteroj kaj dokumentoj venantaj el germanlingvaj teritorioj. Oni do devus diri: "Kvankam la esperanto-elsendoj de SRI ne okazas ĉiutage, ili tamen atingas la nombron de po 17 en semajno.

A.- Ni atentigas pri tiu eraro, ĉar ni opinias, ke ĝentileco en esperanto-rondo devas celi la reciprokan lingvan perfektigon, kontraŭe al tio, kion oni rimarkas en la nacilingvaj medioj. Nacilingve infanoj akceptas esti gvidataj en la lingvo-uzo. Sed inter plenkreskuloj malofte okazas reciproka korektado. Tial plenkreskuloj tiel malfacile povas memlerni fremdan lingvon en plenkreskula lingvo-medio. Oni lasas ilin en ties falsaj lingvo-uzoj. Estus malĝentile korekti plenkreskulon, oni pensas. Ni agu, por ke ne estu tiel inter esperanto-parolantoj. Ĝentileco celu reciprokan korektadon de la eraroj.

Cl.- La vorteto po estas konsiderenda kiel prefikso, kiu metiĝas antaŭ la nombra indiko, kies ripetadon oni volas reliefigi. Po 17 en la semajno signifas, ke refariĝas 17 elsendoj semajnon post semajno.

A.- Vi diris, ke la vorteto po estas konsiderenda kiel prefikso. En PIV oni legas, ke ĝi estas prepozicio.

Cl.- Jes, tradicie oni listigas la vorteton po inter la prepozicioj. Pro tio multaj neniam aldonas la akuzativan markon post ĝi. Sed iom post iom oni konstatis, ke tiuj akuzativaj indikoj estas tamen necesaj, kaj oni komencis dubi pri la praveco de la prepozicieco, kaj atenta lingva observo fakte demonstras, ke po estas simple prefikso, do listigebla inter la prefiksoj.

A.- Estus bone foje dediĉi didaktan rendezuon al tiu ĉi vorteto po.

Cl.- Vi pravas.

A.- A. LEGRET en Vire, Francio, sendis esperanto-poŝtkarton kun slogano, kiu akcentas la facilecon de esperanto. La franca teksto asertas: "L'homme qui apprend plus vite que son ombre. Esperanto: une langue pour tout le monde."

Cl.- Por esperantigi tiun formulon ni troviĝas antaŭ grava problemo, ĉar en la franca ĝi fakte signifas nenion. "Viro lernanta pli rapide, ol sia ombro, esperanto: ĉies lingvo."

A.- Ombro ne lernas, sed moviĝas tre rapide, kaj inter lernanto kaj ombro ne estas rilato.

Cl.- Ni plurfoje citis dirojn de aŭdantoj, kiuj plendas pri la malfacilo esprimi metaforojn en esperanto. Mia respondo estas, ke malbonajn metaforojn oni pli facile rimarkas en esperanta vesto, ol kiam ili kaŝiĝas en nacilingvaj formuloj, tio verŝajne pro la precizemo de esperanto.

A.- En esperanto ni volas, ke la aliaj povu kompreni nian penson. Ĉu la aŭtoro de la slogano en la franca tion reale volis? Verŝajne ne! Li nur volis komprenigi, ke esperanton oni lernas rapidege.

Cl.- Pri tiaj lingvaj demandoj skribis Joaquim LAGARTIXA en Mora, Portugalio, kiu aŭskultis kun intereso niajn pridadaktikajn prelegojn. Li konstatis, ke:

A.- "...la esencan strukturon de la lingvo laborema komencanto kapablas ellerni dum kelkaj monatoj da studado intensa. Tamen, postkiam li asimilis la fundamentojn, tiam li rimarkos, ke staras antaŭ li pli malfacile transigebla problemo. Temas pri la semantiko de esperanto. Almenaŭ por progresantoj estas ofte malfacile percepti la sencon de certaj vortoj, kiujn oni povas uzi striktasence, kaj kiujn metafore.

Cl.- Joaquim LAGARTIXA donas ekzemplojn. Unu el ili ni citu:

A.- "La pluvo vipas la pavimon".

Cl.- En tiu frazo, li diras, la verbo "vipi" estas uzata metafore. La problemo estas scii, kian metaforan lingvaĵon oni rajtas uzi kaj kian ne. Alia temo proponita estas la sinonimoj en esperanto, kiuj rilatas ĝenerale al la enkonduko de neologismoj.

A.- Ni konstatas, ke la didaktika rendezuo, kiun ni proponis, vekis grandan intereson. Multaj skribintoj petis fotokopion de tiuj elsendoj, kaj, kiel Joaquim Lagartixa, proponis studtemojn.

Cl.- Nia ĝisnuna didakta celo estas alporti novajn ideojn por kurso enkonduka al esperanto. En aliaj rendezuoj ni daŭrigos nian instruadon. Ni deziras antaŭ ĉio konduki la aŭskultantojn al esplora sinteno prilingva. Antaŭ ol decidi, kiaj metaforoj estas akcepteblaj aŭ ne en esperanto laŭ teoria vidpunkto, oni unue listigu ilin en originalaj kaj tradukaj verkoj prozaj kaj poeziaj, kaj oni ekzameni la nivelon de ilia trafeco. Originala ĉefverko de Zamenhof, La proverbaro, estas tiurilate studinda. Ĝi konstatigas, ke Zamenhof estis tre konscia pri semantikaj demandoj. La esperanta beletro estas jam pli riĉa je bonaj kaj malbonaj ekzemploj, ol ĝenerale imagas la esperantistoj. Malbona metaforo nebuligas tekston.

A.- Ni sciigu, ke la revuo **Literatura Foiro** publikigos sub la formo de artikoloj la didaktikajn rendezuojn, kiujn multaj aŭdantoj tiom ŝatis.

Cl.- Salutojn al Rosario LICITRA en Roma, Italio, Mahn LOTHAR en Rottweil, Germanio, Laŭrinda MAC GILLIVRAY en Nova Scotia, Kanado, kiu skribas:

A.- "Ne estas aliaj geesperantistoj en mia urbeto; tial aŭskulti esperantajn elsendojn helpas min praktiki la lingvon,"

Cl.- Antaŭ ol konkludi ni ankoraŭ salutas Cornelius J. MACKOWN en State College, en Usono kaj Andrew MARSZALKOWSKI en Gdansk, Pollando, kiu sendis raporton pri la aŭskulto de 18 elsendoj ĝenerale bone kaptitaj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj André GACOND remalfermos sian leterkeston por saluti skribintojn. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*